

TEA-BULTENO

21^A JARO - N^o 143

MAJO-JUNIO

N. 5-6/2018


Libroj utilas por montri al homo, ke tiuj liaj ideoj tiel originalaj neniel estas tiel novaj.
Abramo Lincoln (1809 - 1865)

Kara Legataro!

Printempo ja alvenis, sed ŝajnas, ke ĝi ekmontris nur sian kapeton, ĉar ĉeporde jam sin prezentis somero. Temperaturoj neatendite atingis 28 gradojn, la strandoj pleniĝis je sunumantoj kaj, en Karsto, estis kvazaŭa eksplodo bunta kaj

bonaroma de ĉiaspecaj floroj. La Naturo, ene de unu semajno ekde la aprila duono, rapide vestis arbojn, arbustojn, herbejojn per verdo kaj ruĝa, viola, flava, blanka koloroj: la okuloj brilegis pro ĝojo kaj enspiro de tiu balzama aero forigis el la korpo ĉiajn vintrajn dolorojn!

Kaj kiel ĉio ĉi influas nian vivon? Ĝi pleje stimulas nian vojaĝemon, cele al renkontiĝo kun nia amikaro, por ĝui kune la belajn kolorojn kaj la dolĉajn aromojn de la internacia amikeco! Nu, ek' al la kunven' kun la amikar' de la Alp-Adria Rond'!
Via Redaktanto



ESPERANTO-RONDO de ALP-ADRIO

20^a ESPERANTO-KONFERENCO
Bjelovar – Kroatio - 8-10 de junio 2018

Temo: ALP-ADRIO KAJ DANUBIO



PROVIZORA PROGRAMO - Konferencejo: Urba Muzeo de Bjelovar - *Trg Eugena Kvaternika 1*

8a Vendredo	12h00	Sidejo de Bjelovara E-Societo: ul. Ivana viteza Trnskog 12
	16h00	Akcepto de partoprenantoj, disdonado de dokumentoj, loĝigo.
	18h00	Vizito de la urbo kaj de ekspozicio pri urboj kiuj gastigis pasintajn Konferencojn, en la Popola Biblioteko Petar Preradović
	20h00	Vespermanĝo, libervola, laŭeble kune.
	20h00	Interkona vespero ĉe Bjelovara Esperantista Societo, aŭ biertrinkejo.
9a Sabato	9h00	Urba Muzeo de Bjelovar, Trg Eugena Kvaternika 1
	10h00	Akcepto de partoprenantoj, disdonado de dokumentoj.
	10h00	Oficiala malfermo de la 20 ^a Alp-Adria Konferenco: Edvige Ackermann kaj Organizantoj.
	11h00	Salutoj de Aŭtoritatoj, salutoj de reprezentantoj de la grupoj.
	11h00	Prelego pri la Konferencaj temoj kaj diskutoj.
	13h00	Rapida tagmanĝo.
	14h00	Ĝenerala Asembleo de Esperanto-Rondo de Alp-Adrio.
	16h00	Hotel Central - Koncerto de Neven Mrzlečki.
	18h00	Kultura kaj amuza programo.
	21h00	Fermo de la Konferenco kun salutoj al buse forirantaj partoprenantoj.
10a Dimanĉo	9h00	Ekskurso al Daruvar: vizito de la urbo, vin-foiro, sinbanado en la termalbanejo, tagmanĝo
	18h00	Foriro de lastaj partoprenantoj kaj... Ĝis la revido en la 21 ^a Konferenco.

GRAVAJ INFORMOJ!

Por ke la jubilea konferenco estu kiel eble plej solena prezento de nia agado, la Komitato kaj la lokaj organizantoj petas aliĝon kaj partoprenon de esperantistoj el la regionoj de Alp-Adrio kaj Danubio, sed ankaŭ de alilandanoj. Por stimuli partoprenon, la organizantoj anoncas minimumam konferenckotizon de 7 eŭroj (aŭ 50 kunaĵoj, por kroatoj). La kotizo ne inkluzivos la kostojn de vojaĝo, loĝado, manĝoj kaj ekskursoj. Vizitu ankaŭ la ttt-ejon: http://www.esperanto-bjelovar.hr/arihiva2018_e.html#alpeadria

Bonvenon al la 20^a Alp-Adria Konferenco!

Triesta eminentulo

Komence de aprilo perradie mi aŭdis, ke okazos la inaŭguro de pentroekspozicio, ĉe centrourba galerio, pri tre konata, almenaŭ en Triesto, pentristo: estos elmontrataj liaj lastaj verkaĵoj, finfaritaj decembre 2017. Mi intence mencias la daton, ĉar indas scii, ke li ĵus festis sian 95-jariĝon. Lia nomo estas Aldo Bressanutti. Mi estas lia fervora aprezanto kaj eĉ posedas unu lian pentraĵon el la jaro 1970^a, kies bildo prezentas parton de malnova triesta kvartalo. Nepris do ĉeesti la ceremonion, ankaŭ ĉar la aŭtoron kaj ties ĉi pentraĵojn prezentis Marianna Accerboni, tre kompetenta artkritikistino.

Ŝia parolado komenciĝis per tre trafa titolo: "Aldo Bressanutti, la granda eta mondo de knabo-pentristo". La parolado pri lia biografio estis tiom atentokapta, ke neniu kuraĝis eĉ soneton eligi, kaj - la plej stranga el ĉiuj strangaĵoj! - ĉiuj poŝtelefonoj silentis.

Oni aŭdis sensacian rakonton pri lia vivo, jam ekde... tuj, t.e. ekde lia apero en ĉi mondo. Li naskiĝis, neatendite, sur ĉaro plenplena je karbo kaj tirata de ĉevaloj, direktita de lia patrino. En apudeco de Latisana [Latisana, en regiono Friulo Juli-Venetio] survoje al Triesto, li decidis enmondiĝi: lia korpeto ekruliĝis inter la karbaj sakoj, ĉar abrupte la umbilika ŝnuro ŝiriĝis. Al tiu aventura komenco aldoniĝis infaneco plena je malfacilaĵoj kaj mizero. Li mem rakontis, ke matene lia panjo iradis al placo *Ponterosso* (apud la granda kanalo) por vendi legomojn, sed nenion por manĝi lasis al sia infano. Ili du vivis en la malnova urba parto, en domo plena je cimoj. La najbaraj, kompatemaj vendistoj matene donadis al la bubeto iom da pano kaj iom da lakto, kaj tio devis sufiĉi ĝis la vespero, kiam la gepatroj alportis kelkan manĝaĵeton. Kiam li estis 6-jara, ili forlasis lin en orfejo, kie li pasigis entute 9 jarojn. Post tiu periodo lia lito estis publikgardena arbustaro kaj manĝaĵon li ricevis nur ĉe la Instituto por malriĉuloj. Havante pli-malpli 20 jarojn, li estis internigita en la laborkampojn de *Ludwigshafen* kaj *Mannheim*, dum la frato, deportita "sen ia ajn kialo" mortis en *Buchenwald*. Li fuĝis el Rejnlando kaj haltis en Innsbruck; en 1945-46 li restadis en Norda Tirolo ĉe bieno, kiel kamparano. "Ĉiutage mi iradis al la fervoja stacidomo, por kontroli, ĉu sur la trajnoj plenaj je italaj elfuĝantoj el Ger-



manio, fine de la mondmilito, troviĝis ankaŭ mia frato."

Ekde 1946 li komencas sian laboradon kiel pentristo, pentrante per krajono kaj ĉina inko, gravurilo kaj peniko. Nelacigeble kaj entuziasme, li interpretas la periodon de la "povruloj", karakterizitan de la bone konataj simboloj: hejmaj internoj kun muroj senstukaĵaj, duonruiniĝintaj, traigitaj de ironia, moka mizereco, en kiuj la sento de malorda forlasiteco naskigas amaran rideton; malnovaj ĉifitaj ĵurnaloj, senplandumaj ŝuoj, truigitaj pluvŝirmiloj, speguloj spegulantaj nenion, hejtiloj kaj pupoj rompitaĵoj... La bildigado akre vekas forgesitajn rememorojn, kunligante pasintecan kun estantecon, kaj plie atestas la krudan realon de la *Citavecchia* [Cittavecchia - *Ĉitavekja*; triesta malnova kvartalo, iam loĝata de la plej malriĉaj homoj], kiu ne plu ekzistas, sed kiun ni povas trovi en la verkaĵoj de Aldo Bressanutti.

En ĉi lasta jardeko li proponis siajn pentraĵojn en pluraj italaj kaj eksterlandaj urboj: de Milano al Romo, de Ĝenovo al Berlino, al Toronto, Melbourne, Tenerifo, Düsseldorf, Londono, Berno ktp, ĉiam vekante grandajn interesojn kaj scivolemon kaj ricevante notindajn sukcesojn flanke de la publiko kaj kritikistoj. Liaj ellaboraĵoj troviĝas en pluraj privataj kolektoj kaj en Muzeoj, institucioj en- kaj eksterlande.



"Li estis destinata por vivo aventurema, kiel atestas la vivkomenco", konkludas la artkritikistino, "pro la mizero suferata infanaĝe kaj adoleskule: ĉio ĉi elvokas temojn priskribitajn en la sociaj romanoj de la 19^a jc, de aŭtoroj kiel Dickens, Zola, Gorkij. Tamen tiaj cirkonstancoj, kiujn liaj kuraĝo, inteligenteco kaj entreprenemo sukcesis domini, transformis lin danke al lia talento en venkanton. ED

Dumvive foje necesas luktosci, ne nur sen timo, sed eĉ sen espero.

Alessandro Pertini, ĵurnalisto, politikisto (1896-1990)

Laste trovitaj!

Jen interesa poŝtkarto (pk), laste trovita, kies plej granda interesaĵo ne tiom estas ĝia fronto - Baziliko de Sankta-Antono en Padova -, aŭ ĝia dorso kun priaj klarigoj, ĉio en Esperanto, sed la tre konataj adresinto kaj adresito.



La pk estis sendita la 14^{an} de majo 1930 de Geo Canuto al "Estimata Profesoro Peano", nome Giuseppe Peano, kiu tiam loĝis en Torino en strato *Barbaroux* 4. Iom da historio pri tiu ĉi strato, kiu estas unu el la plej fascinaj lokoj de la malnova urbo: tie troviĝas la bel-ega Preĝejo de Mizerikordo (komence de la 18^a jc), nobelulaj palacoj, ankoraŭ nun loĝataj... eĉ de fantomoj, mezepokaj restaĵoj, la domo de Cagliostro [Kaljostro], la fama aventuristo kaj alkemiisto... La strato estis dediĉita en 1860 al Giuseppe Barbaroux, advokato kaj politikisto, lerta kaj sperta ambasadoro de Sardinia regno, kaj leĝofaranto.

Sed ni revenu al la du famuloj. Unue pri Geo (Georgo) Canuto [Kanuto]. El lia respondo, oni povas dedukti, ke prof. Peano estis de li petinta "kopion de la n-ro 1 de la Revuo", kiu - respondis G. Canuto - "bedaŭrinde estas tute elĉerpita pro la granda, neantaŭvidita pliiĝo de la abonantoj en la unuaj monatoj." Tio ĉi - miavidpunkte - estas signo, unue ke ekzistis iaj rilatoj inter Canuto kaj Peano kaj due, ke iel ĉi lasta *almenaŭ komprenis la lingvon en skriba formo*. Pri tio ĉi, jen plia rimarko de Antonio de Salvo: *la fakto ke Canuto skribis en Esperanto ne nepre pruvas, ke Peano funde konis Esperanton; [...] kiam li skribis al la Revuo, aŭ al Minnaja, li skribis en la itala*.

Jen kelkaj sciigoj pri Georgo Canuto.

Li naskiĝis en Torino, en 1897, kaj mortis tie en 1960. Medicinisto kaj sekve Universitata profesoro pri jurmedicino, li ekokupiĝis pri Esperanto en 1925. Lia esperantista kariero estis notinda kaj plurfaceta: En 1928 li fariĝis vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio; la postan jaron en Torino li okazigis perradian kurson. Entuziasme li dediĉadis al kursoj, prelegoj kaj ekzamenoj. Li verkis en Esperanto plurajn artikolojn jurmedicinajn. En 1935,

dum la UK en Romo, lia nomo eniris la liston de la plej eminentaj esperantistoj, kiaj estis Gen. Louis Bastien, prof. Stefano La Colla, Julio Baghy, Teo Jung kaj aliaj. De 1956 ĝis 1960 li funkciis kiel prezidanto de la Universala E-Asocio, krom esti ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto. Al li estas dediĉita la "Fondaĵo Canuto" de UEA, kiu helpas aktivulojn, el ekonomie malfortaj landoj, iĝi UEA-membroj.

GIORGIO CANUTO

Canuto, forto kaj ornamo de F.E.I. kaj movado nia, aspektas ĉiam simpatia, kaj nin honoras lia famo.

Sciencajn verkojn li, laŭ plano, verkas en lingv' internacia.


Canuto, forto kaj ornamo de F.E.I. kaj de movado nia.

Ĉiam ricevas li aklamon, dum la kongres' internacia, se li dum la preleg' lekcia parolas pri sciencprogramo.

Canuto, forto kaj ornamo.

*Verkita de Giordano Azzi
Como, 7.09.1953*

Kaj nun io pri la adresito, profesoro Giuseppe Peano. Naskiĝinta en 1858 en Spinetta di Cuneo, Piemonto, kaj mortinta en Torino en 1932, li eminentis en kampoj matematika kaj logika. Jam en 1884 li verkas traktaĵon pri la "Diferenciala kalkulo kaj principoj de integra kalkulo", krom pluraj aliaj poste eldonitaj, kies enhavoj alportis notindajn kontribuojn al la matematika scienco: pri la ar-teorio, projektiva geometrio, aritmetikaj fundamentoj, vektoraj kalkuloj k.a. Lia ĉefcelo estis forigi ĉiajn ambiguecojn el matematiko. La kvin aksiomoj, konataj kiel "la aksiomoj de Peano" iĝas la bazo por la konstruado de aritmetiko kiel logika sistemo. Sian talenton tamen li uzis ne nur en la matematika scienco, sed ĝin transigis ankaŭ al la lingva.



En paĝoj de la revuo "L'Esperanto", 1921-11, aperas respondletero lia al Prof. Meazzini, rilata al recenzo de la profesoro pri la "Vortaro Canesi" (aŭtoro G. Canesi - *Interlingua, lingua internazionale con ortografia latina: Vocabolario interlingua, italiano, inglese e italiano, interlingua*. Torino, 1921). Per tiu letero oni malkovras, kial G. Peano decidis ellabori internacian lingvon. "En 1903" li diras, "por publikigendaj libroj pri matematiko, mi ekuzis la «latino sine flexione»-n, nome la latinan vortaron sengramatikan: tiel



La bildo de Georgo Canuto sur la kovrila paĝo de "Esperanto" de UEA, dec. 1960, okaze de lia forpaso.

mi sukcesis pli bone interkompreniĝi, ol uzante la italan, aŭ la francan aŭ la klasiklatinan...

Kiu konas la italan, komprenas sendube la sengramatikan italan lingvon: «Mi havi libro, ci havi du libro, morgaŭ mi esti en Romo». Tiu ĉi estas la lingvo parolata de la angloj kiuj trairas nian landon. Per dulingva vortaro oni tradukas de la itala sengramatika al la norvega sengramatika, [...]

[...] Sufiĉas studi centon da plej necesaj vortoj kaj meti envice, unu post la alia, por ne iĝi mutaj en fremda lando

[...] *Latino sine flexione* havas nek gramatikon, nek propran vortaron; ĝi ne povas iĝi komercaĵo nek spekulacjo.

En la sekvo de la letero G. Peano rakontas, ke li estas la direktoro de la *Akademio pro Interlingua*, al kiu iu ajn interesito povas aliĝi, pagante la jarkotizon. La membroj rilatas inter si per ajna lingvo kaj interdiskutas pri la diversaj lingvaj problemoj. Ĉiu ano – laŭdezire – eldonas siajn verkaĵojn kaj ĝuste en 1921, inĝ. G. Canesi [Kanezi] publikigis “Vortaro interlingva itala-angla”-n, kies recenzon prof. Mezzini faris. Sekvas komento pri tiu ĉi libro, por kiu li mem skribis la antaŭparolon, pri lia aperigo de studo pri “Gramatika problemaro”, rapida elmontrado de la gramatikaj formoj troveblaj en diversaj lingvoj, pri kiu li asertis: “nenion per ĝi mi intencis pruvi. Mi estas scienculo kaj ne advokato”.

Esperanto

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo.

Venu via regno.

Fariĝu via volo,

kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Amen.

Latino sine flexione

Patre nostro, Qui es in celos,
que Tuo Nomine fi sanctificato.
Que Tuo Regno adveni;
que Tuo Voluntate es facta
sicut in celo et in terra.

Da hodie ad nos nostro pane quotidiano.
Et remitte ad nos nostro debitos,
sicut et nos remitte ad nostro debitores.
Et non induce nos in tentatione,
sed libera nos ab malo.
Amen.



Konklude: “Mi fidas la baldaŭan triumfon de la internacia lingvo, rezulto de ĉies laborado. Ni devas nin reciproke subteni kaj helpi, celante persvadi la grandan publikon, ĝis nun nekredeman. Kaj la estonta lingvo nomiĝos Esperanto, se ja estos la esperantistoj tiuj, kiuj eldonos la plej gravajn traktaĵojn.”

La letero estis verkita de la elstara matematikisto la 5^{an} de novembro 1921, kaj tiel subskribita: «G. Peano - Prof. pri Kalkulado ĉe la Reĝa Universitato de Torino.»

Estis tre interese konatiĝi kun tia personeco: fama matematikisto kaj logikisto, kiu - ĝuste pro sia kunnaskita logikeco - trovis absolute prava la klopodon de iuj gravuloj, forigi por ĉiam la problemon tuthomaran de manko de senpera interkompreniĝo.

Ankoraŭ io aldonendas, io rilata al Triesto: en *L'Esperanto*, 1922-4, per sia sistema esplorado, Antonio de Salvo malkovris atentokaptan komunikon. En Triesto estis nomita speciala komisiono fare la Itala Societo por la Progreso de Sciencoj, kiu estis taskigita “informadi pri la situacio de la Esperantomovado kaj pri la plej taŭgaj metodoj por plifaciligi ties evoluon”. Pluraj gravaj italaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj apogis tiun projekton, kaj elinter tiuj aperas ankaŭ la jenaj nomoj: D-ro Koch, Ŝtataj Fervojoj, Piazza Vittorio Veneto, Triesto; D-ro A. Ghez, Centra Oficejo Reĝaj Poŝtoj, Triesto.

Fontoj: Bitoteko.it; Antonio de Salvo; Vikipedio

Latino

Pater noster, qui es in cælis,
sanctificetur nomen tuum.

Adveniat regnum tuum.

Fiat voluntas tua,

sicut in cælo, et in terra.

Panem nostrum quotidianum da nobis hodie,
et dimitte nobis debita nostra,
sicut et nos dimittimus debitoribus nostris.
Et ne nos inducas in tentationem,
sed libera nos a malo.
Amen.

Kelkaj notoj pri ĝiaj ĉefaj lingvaj ecoj:

- ✪ La alfabeto estas perfekte fonetika: por ĉiu letero ununura sono.
- ✪ Ne bezonatas komplikaj gramatikaj reguloj por paroli aŭ kompreni lingvon: sufiĉas subjekto kaj adverbo por esprimi la verban funkciadon; sufiĉas la pozicio de la subjekto por distingi ĝin de la objekta komplemento.
- ✪ En ĉiuj modernaj okcidentaj lingvoj ekzistas komuna latinvorta bazo, sufiĉa por krei vortaron unuavide kompreneblan al italoj, angloj, rusoj, francoj, havantaj mez/supergradan klerecon.

Eliksiro pri longviveco

En rubriko pri scienco aŭ medicino, aperanta ĉiusemajne en la loka tagĵurnalo triesta, altiris mian atenton tre alloga titolo: "De Paskinsulo la eliksiro kontraŭ maljuniĝo". Tio tuj interesis min, ĉar ja mi atingis tiun aĝon, kiam oni ekpripensas pri la pli mallonga vojo antaŭ si. Nu, bonvenon al iu ajn rimedo, kiu permesus ĝoji pri plezuraj travivaĵoj, kiujn la vivo fojfoje donacas.

Unuspire la artikoleto estis legita, sed verdire ĝi ne tiom kontentigis min. Tamen diredas, ke la malkovro certe havis tre gravan benefikon sed en tute alia kampo.



Jen eta klarigo pri la kialoj de tia esplorado. En 1965 Paskinsulo estis celo de ekspedicio de teamo da fakuloj, subtenataj de farmacia entrepreno, kiuj esploris la Pacifikajn Insulojn serĉe de grundobakterioj kapablaj produkti

antibiotikojn kontraŭ la fungoj. Fakte oni eltrovis la celitaĵon: temas pri la molekulo nomita Rapamicino, el *Rapa Nui*, kio signifas "granda insulo/roko"-n en la polinezia lingvo. Evidentiĝis, ke ĝi efektive estas tre potenca imunoinhibanto, kiu jam de ĉ. 30 jaroj estas utiligata por malhelpi la rifuzan reagon okaze de organaj transplantoj. Entute vere tre grava ĝia benefiko tiukampa.

Esplorado pluen iris, ĝis kiam aliaj esploristoj malkaŝis ke la medikamento haltigas la laboron de iu proteino (*mTor*), kiu metaboligas konsiderinde la ĉelojn, simplavorte ĝi, sen nutraĵoj, malaktiviĝas kaj la rezulto estas la samo, kio okazas sekve de malplia alporto de kalorioj en korpon. Do, dieto malriĉa je kalorioj promesus pli da sano kaj vivplilongiĝon. Atentu, tamen, tia devus esti la konsekvenco, sed la eksperimentoj ĝis nun estis, kaj estas, farataj nur sur la kompatindaj bestoj. Laŭ ĝisnunaj atingoj, oni konstatis ke tiu "kuracilo" plilongigas la vivon de la musoj je preskaŭ 30 procentoj, kio estus por la homo – teorie – kiel se oni povus vivi pli multe, nome ekde 90 ĝis 120 jaroj. Ŝajnas, ke Rapamicino pliigas la memorkapablon kaj preventas – ankaŭ en la homo – la ekeston de la Alzheimer-malsano.

Sed ĝi donas ankaŭ malajn efikojn: blokas la imunan sistemon kaj estigas diabeton, kiuj ja estas nepre prikonsiderindaj. La ĉasado por eltrovi pli sekurajn molekulojn, havantajn la povon inhibi la tiel diritan *mTor*-on sen flankaj malsanigaj efikoj, jam delonge komenciĝis, sed kiom da bestoj intertempe suferados por ke la homa vivo plilongiĝu? Ĉu vere ĉio ĉi alportos feliĉon kaj kontentecon al la homaro? En kiaj kondiĉoj estos la homa korpo post vivado pli ol centjara? Pli bone pripensi, ĉu ne?

Plasto en maro kaj poluado

(Unua parto)

Unu el la plej gravaj kaj malfacile elimineblaj kaŭzoj kiuj endanĝerigas la estontecon de la Naturo en la tuta planedo, estas la plasto. Plasto ĉiam pli kaj pli ĉeestas en la maro, ĉiam pli kaj pli estas ĵetata en la maron de NI, la unuopaj civitanoj. Ni rigardu niajn plaĝojn, niajn strandojn: sur ili ne nur kuŝas korpoj sunumantaj, viŝtukoj kaj grandaj sakoj ŝtopitaj per ĉiaj manĝaĵoj (kutime en plasta saketo aŭ en alumina skatoleto), trinkaĵoj (koka-kolao aŭ oranĝa suko aŭ biero en plastaj botelitoj aŭ ladskatoloj), kontraŭsunaj kremoj (en plastaj tubetoj), ... sed troviĝas ĉio kion oni malemas aŭ porti hejmen por ĵeti ilin en iliaj apartaj ujoj por ruba diferencigo, aŭ, eĉ se en la plaĝo mem rubaĵoj ja tie kaj tie ĉi staras, oni ilin forlasas surloke: ja troan streĉan laboron kaŭzas tiu simpla ago, pli facile ŝajniĝi, ke... *hooo, mi forgesis kunpreni la rubojn!*

Ĉiu el ni proklamas laŭte sian atentemon kaj respektemon al la naturo, parole, jes, sed fare??? La fakto estas, ke ni ne sentas nin sponsaj pri niaj malbonkondutoj: "kio povus okazi, se NUR hodiaŭ kaj NUR MI ne respektas la regulojn? Fine mi estas eta ero el la plurmiliarda homaro. Kial mia eta fiago povus ion danĝeran esti en la tuta tero?" Foje tiela estas la unuopula penso, kaj nenio sukcesas lin/ŝin konvinki pri la malo. Sed bedaŭrinde eblas konstati, ke malbonedukitoj, mistraktantoj de la komunaj homaj havaĵoj apartenas al iu ajn generacio: ĉiuj ni estas en la sama kaldrono, pretaj detrui porĉiame, kion ni ĝuis ĝis la plej lasta momento, lasante - eĉ sen senti ian ajn konscienciproĉon - la estontajn generaciojn senaj je tiuj riĉaĵoj, kiujn la Naturo, grandanime kaj larĝamane, metis, kaj metas, je la tuthomara dispo.



Sen tempomalŝparo, tiu simpla fendaĵo, nome neforĵetado de ruboj enmaren, iĝante iom post iom ĉiutaga kutimo de ĉiu el ni, ege povas redukti la kvanton da plasto flosanta en maroj kaj oceanoj.

Nuntempe videblas laŭlonge de la marbordoj tioma amaso de tiu materialo, kiu, krom endanĝerigi ĝismorte la marajn flaŭron kaj faŭnon, nocas ankaŭ la homan sanon.

Enketo de *Legambiente* (Medi-Ligo) prilumis tiun problemon, disponigante donitaĵojn pri

Maja Programo	
4a, vendredo	20h00 - Denove en Bazilikato!
8a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
11a, vendredo	20h00 - Ni legu kune libron!
15a, mardo	18h00 - Unua-gradna ekzameno
18a, vendredo	20h00 - Gramatikaĵoj, por kune ludi kaj amuziĝi
22a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
25a, vendredo	20h00 - Ni legu kune libron!
29a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
Junia Programo	
1a, vendredo	20h00 - Bildoj pri Parizo
5a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
<i>8a, vendredo 9a, sabato 10a, dimanĉo</i>	<i>20a Alp-Adria Konferenco en Bjelovar, Kroatio Temo: Alp-Adrio kaj Danubio</i>
12a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
15a, vendredo	20h00 - Ni legu kune libron!
19a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
22a, vendredo	20h00 - Raporto kaj fotoj pri la 20 ^a AA-Konferenco
26a, mardo	18h00 - Unua-gradna kurso
29a, vendredo	Somera Festo... en <i>osmiza!</i>

Atentigo!

Ekde la 1^a de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita.

La redaktanto de la TEA-Bulteno tamen ne ripozos kaj akurate (eble!) atingos vin via ŝatata informilo.

Tradicia Festo ĉe Anita: sabaton la 21^{an} de julio 2018, ekde la 17^a horo! Ĉiuj estas varme invitataj!

Bonan feriadon kaj ĝis la revido en TEA-sidejo, vendredon la 7^{an} de septembro, je la 19^a horo!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242
000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Uno per tutti ... cinque per mille! AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO!

*Il 5 per mille dell'IRPEF
all'Associazione Esperantista Triestina
Associazione di volontariato
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni di legge, possono destinare il **5 per mille delle imposte** a sostegno delle Associazioni di **VOLONTARIATO**.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

È sufficiente indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella per il VOLONTARIATO nel momento in cui si effettua la dichiarazione dei redditi (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc).

**Il codice fiscale da indicare
è il seguente:**

90012340320

Invitiamo perciò amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi questo numero di Codice Fiscale.

GRAZIE!!!

ĝia amplekso. Intensaj kontroloj de 62 marbordaj pozicioj rezultis, ke averaĝe troviĝas 670 rubaĵoj ĉiujn cent metrojn kaj la unuan lokon "gajnas" la plasto, kiun sekvas vitraĵoj kaj ceramikaĵoj, metaloj, paperoj kaj kartonoj. Statistikoj raportas, ke en la maro flosas plastaj saketoj, aĉetsaketoj, kovertoj, sed ankaŭ aliaj objektoj el plej diversaj formoj: oni ne kulpigu do la plurnaciajn entreprenojn, ĉar sciate estas, ke la 54 procentoj devenas el hejmaĵoj.

Mi ne estas scienculo, sed kredeble unua faro devus esti la malplia produktado de plastaĵoj kaj, bonŝance, en tio ĉi multe helpas la disvastiĝantaj sciencaj serĉadoj celantaj elfari novajn, ekologiajn materialojn.

Nun kelkaj interesaj notoj, pri kiom da tempo estas bezonata, por ke la ĵetitaĵoj malaperu: por kartona skatolo necesas unu monato; por rulaĵo el higiena papero du monatoj; por vindaĵo de beboj, tiu "uzu kaj forĵetu!", 200 jaroj! Kio pri la cigaredostumpoj, konsidere ke en la mondo estas ĉirkaŭ 1,5 miliardoj da fumantoj? Tiuj stumpoj estas tre poluaj kaj danĝeraj por la medio pli ol la industriaj rubaĵoj. Ĉie ajn eblas konstati, ke multaj senskrupululoj ĵetas ilin en maron, riverojn, lagojn ktp. En Mediteranea maro ili reprezentas la 40 procenton el ĉiuj ruboj!

EIDO

(daŭrigo en venonta Bulteno)